


*The*  
NORTH AMERICAN  
ESPERANTO REVIEW



*3-7 Julio, 1957*

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Marto - Aprilo • 1957

V:2

### *The North American Esperanto Review*

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

*Addresses:* Subscriptions and bulk orders should be sent with payment to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: F. R. Carlson, 2116 North 35th St., Seattle 3, Washington.

*Deadlines:* The *Review* is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the Editor no later than the fifteenth of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *President:* John L. Lewine, 50 Overlook Terrace, New York 33, New York; *Vice-President:* James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; *Secretary:* Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer:* Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

*Membership Dues:* Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

*Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.*

*Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."*

### The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 5, No. 2.

Mar.-Apr., 1957.

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

*La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.*

### CONTENTS (English)

V for Victory . . . . .	Page 1
Going Like a House Afire . . . . .	2
Tentative Program, Vth Congress . . . . .	3
New York, City of Culture . . . . .	6
Esperanto Vagabonds in Europe . . . . .	11
Addresses* (See note below) . . . . .	15
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto . . . . .	Inside Back Cover
ENHAVO (Esperanta)	
V por Venko . . . . .	Paĝo 1
Provizora Programo, Va Kongreso . . . . .	3
Silabenigmo . . . . .	4
Letero el Hungario . . . . .	5
Trans la Lingvajn Barilojn . . . . .	7
Nia Literaturo . . . . .	8
Esperanto en Norda Ameriko . . . . .	9
Bonvolu Skribi (Korespondpetoj) . . . . .	10
42a Universala Kongreso de Esperanto Voĉpondu! . . . . .	12
Adresoj*(Vidu noton sube) . . . . .	15
Por Rimistoj . . . . .	16

\* Persons or groups listed are not necessarily affiliated with the League. We request, therefore, that inquiries concerning the *Review* or the national Esperanto movement be directed to the proper officials of the League, as listed above.

\* Ĉar ne ekzistas filia rilato inter lokaj grupoj kaj la landa asocio, ni petas ke oni sendu ĉiujn demandojn kaj komunikaĵojn rilate la tutlandan Esperantan movadon rekte al: Esperanto League for North America, Inc., RFD 1, Meadville, Pennsylvania, Usono.

# *The* NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 5

Mar.-Apr., 1957

No. 2

## V for Victory por Venko a Kongreso

Kongreso numero V. 4—7 Julio, 1957.  
La simbolo taŭgas al la okazo.

Ĉie en la mondo ni vidas grandan ondon de entuziasmo por la internacia lingvo.

En USSR kaj aliaj orienteŭropaj landoj, en Brazilio, en Azio, la nerezistebla tajdo leviĝas.

Homoj bonvolaj ĉie deziras disbati la lingvajn barilojn kiuj apartigas popolon de popolo.

Ili amase aliĝas al la verdstela standardo de Esperanto, la simbolo de la espero ke la tempo estas veninta por interkompreno inter la popoloj de la mondo.

Ĉi tiu Kongreso de la Venko lanĉu la grandan kampanjon por starigi la popolojn de Norda Ameriko en la avangardo de mondo dediĉita al paco kaj amikeco.

**Venu al la Kongreso!**

Congress number V. July 4—7, 1957.  
The symbol fits the occasion.

Everywhere in the world we see a great wave of enthusiasm for the international language.

In the USSR and other East European countries, in Brazil, in Asia, the irresistible tide is rising.

People of good will everywhere want to smash the language barriers which separate people from people.

They are flocking to the green-star standard of Esperanto, the symbol of hope that the time has come for understanding among the peoples of the world.

Let this Victory Congress launch the great campaign to establish the peoples of North America in the vanguard of a world dedicated to peace and friendship.

**Come to the Congress!**



ALL OVER THE WORLD

*In our February issue, we reported that 800 persons recently enrolled in Esperanto classes in Leningrad while an equal number had to be turned away for lack of teachers and textbooks, that 1100 persons registered for a radio course in Esperanto in Rio de Janeiro, and that 500 persons turned out for an Esperanto meeting in Hanoi. (Don't send mail to the Hanoi address. U.S. mail is not delivered in Hanoi.)*

### Lithuania

At least 600 persons are enrolled in Esperanto courses in Vilnius (Vilna) and Kaunas (Kovno).

from *Heroldo de Esperanto*

### Esthonia

In Tallinn, 30 Esperanto courses are now functioning, with more than 900 participants. Altogether 2000 to 2500 persons are now learning Esperanto in Esthonia. The State Literature Commission has accepted manuscripts for a dictionary and grammar of Esperanto, and promised to publish them early in 1957.

from *Bulteno de Esperantistoj en Praha*

### Radio Broadcasts in Esperanto

In 1952, 740; in 1953, 844; in 1954, 1012; in 1955, 1168; in 1956, 1428.

### Good Reminders

There are 70 streets or squares, in 68 cities in 14 countries, named "Zamenhof" or "Esperanto".

### Youngsters Go For It

More than 1000 young people are now learning Esperanto in beginners' classes in Bulgaria.

reported in *Revujo Esperanto*

*How's your town doing?*

Let's put America at the top of the list!

## Esperanto League for North America

is building an effective movement in North America for  
ESPERANTO NOW!

We need your help

Join now

## TENTATIVE PROGRAM

of the  
Fifth Annual Congress  
of the  
Esperanto League for  
North America  
1957  
New York, N.Y.



## PROVIZORA PROGRAMO

de la  
Kvina Jara Kongreso  
de la  
Esperanto-Ligo por  
Norda Ameriko  
1957  
Nov-Jorko, N.Y.

JULY 3, evening "mixer" at Esperanto House, 767 United Nations Plaza.

Business meetings mornings and afternoons of the 4th, 5th and 6th of July at Hotel Hargrave, at the corner of 73rd St. and Columbus Avenue.

JULY 4: morning, Official Opening of the Congress. Evening, public meeting.

JULY 6: afternoon, Congress Excursion. Evening, Banquet.

JULY 7: morning, religious service. Afternoon, picnic. After the picnic meal, there will be a meeting of newly elected officers and Board members.

CONGRESS FEE: \$5.

OFFICIALS of Local Congress Committee: Secretary, George Gabor, 733 West 183rd St., New York 33, N. Y. Treasurer, John M. Clarke, 25 Van Reipen St., Jersey City, N. J.

CHAIRMEN of special subcommittees: Science and Medicine, Dr. Robert Rubinstein; Telecommunications, Vegetarianism, Ray Pease; International Organizations, Dr. I. Boone; Philately, Ralph Bonesper; Design, Alex Wesser; Education, Louis Dormont; Public Information, Dr. Alfonso Lomo.

HOTEL Arrangements: see next page.

For further information, write to the secretary of the Local Congress Committee (address above).

3 JULIO, interkonatiga vespero ĉe Esperanto-Domo, 767 United Nations Plaza.

Aferkunsidoj matene kaj posttagmeze de la 4a, 5a, kaj 6a de Julio ĉe Hotelo Hargrave, ĉe la stratangulo de 73a Strato kaj Columbus Avenuo.

4 JULIO: matene, Oficiala Malfermo de la Kongreso. Vespere, publika kunsido.

6 JULIO: Kongresa Ekskurso posttagmeze. Bankedo vespere.

7 JULIO: Diservo matene. Pikniko posttagmeze. Post la piknikmanĝo okazos kunsido de nove elektitaj postenuloj kaj Estraranoj.

KONGRESKOTIZO: \$5.

POSTENULOJ de Loka Kongresa Komitato: Sekretario, George Gabor, 733 West 183rd St., New York 33, N. Y. Kasisto, John M. Clarke, 25 Van Reipen St., Jersey City, N. J.

FAKAJ KOMITATESTROJ: Scienco kaj Medicino, D-ro Robert Rubinstein; Telekomunikaĵoj, Vegetaranismo, Ray Pease; Internaciaj Organizaĵoj, D-ro I. Boone; Filatelio, Ralph Bonesper; Desegnaĵoj, Alex Wesser; Edukado, Louis Dormont; Publikaj Informoj, D-ro Alfonso Lomo.

HOTELAJ Arangoj: sekvantan paĝon.

Por pluj informoj, skribu al la sekretario de la Loka Kongresa Komitato (adreso supre).

## V

HOTEL ARRANGEMENTS FOR  
Visitors and Delegates to the Congress:

HOTEL HARGRAVE (seat of the Congress): Room and bath, \$5 and up.

MANHATTAN TOWERS HOTEL  
(5 blocks away from the Congress): Room and bath, \$4 and up.

\* NEW ENDICOTT HOTEL  
Columbus Avenue and 81st Street (9 blocks away from the Congress. 15¢ for bus ride direct to the Congress): \$3 and up.

\* It will be possible to rent a block of 40 rooms at \$100 per night, i. e., \$2.50 per room per night, if the delegates notify in advance, so that the Committee can make the arrangement. Reservations will be for Thursday, Friday and Saturday nights. Individuals wanting to stay for a longer time should notify the L.C.C. at the earliest possible date.

## V

HOTELAJ ARANĜOJ por Vizitontoj kaj Delegitoj al la Kongreso:

HOTELO HARGRAVE (sidejo del' Kongreso): Ĉambro kun bano, \$5 kaj supre.

HOTELO MANHATTAN TOWERS (5 stratojn for de la Kongresejo): Ĉambro kun bano, \$4 kaj supre.

\* HOTELO NEW ENDICOTT  
Columbus Avenue kaj 81a Strato (9 stratojn for de la Kongresejo. 15¢ por busveturo rekte aj la Kongresejo): \$3 kaj supre.

\* Estos eble, lui grupon de 40 ĉambroj je \$100 por ĉiu nokto, t. e., \$2.50 ponokte por ĉiu ĉambro, se la delegitoj antaŭsciigos, por ke la Komitato povu fari la aranĝon. Rezervoj estos por la noktoj de ĵaŭdo, vendredo kaj sabato. Individuoj dezirantaj resti pli longe devus sciigi al la LKK je plejble frua dato.

### TAPE RECORDINGS

Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa., now has two tape recorders, and can loan tapes on Esperanto. particularly useful for pronunciation.

### MAGNETOFONO

Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa., nun havas du magnetofonojn, kaj povas pruntedoni bendojn pri Esperanto. Utila precipe por la prononcado.

### SILABENIGMO

a ab al al ar ar ar ar at ak ba bo ce di din do dro dron eg  
es fab jo jun ka ka kal ko ko ko lam las lo lo me mo o o o  
o or oj po pro ro ro sab sin ta ta ter to to

El la supraj silaboj formu dudek vortojn, kiuj havu la jenajn signifojn:

1. Lumigilo 2. ĉefo de monaĥejo 3. brulegi 4. fina 5. granda vegetaĵo 6. titolo por viroj 7. kuirilo 8. militistaro 9. tero, kiu konsistas el grajnoj 10. planto uzata por fumaĵo 11. muzikaĵo 12. rakonto 13. militŝiparo 14. muzika verko 15. nediferencanta 16. besto kun barbo 17. parto de teatraĵo 18. herbeca vegetaĵo 19. speco de tirkestaro 20. metalmiksaĵo. Legate de supro malsupren, la unuaj kaj kvaraj literoj de la trovendaj vortoj indikas la titolon de konata Esperanta libro eldonita de la Esperanto Publishing Co., Anglujo.

*Enigmo sendita de A. D. Cook, Skotlando.*

La solvo aperos en la venonta numero. Nur por amuzi; neniu premio.

# Letero el Hungario

*La Helpokomitato por Esperantistoj en Hungario sendis ĉi tiun leteron al Prezidanto Lewine*

Tre estimata kaj kara samideano!

En la nomo de la Esperanto Helpokomitato, kaj ankaŭ en la nomo de ĉiuj hungaraj Esperantistoj ni sendas al vi kaj al ĉiuj samideanoj en Usono niajn tre sincerajn bondezirojn.

Ni estas kortuŝitaj pro via kunsento kaj solidareco. Ja ni travivis dolorigajn tagojn dum "pacaĵ" tempoj La domaĝoj kaj perdoj en la homaj vivoj, en la spiritaĵoj kaj materiaj valoroj estas sufiĉe grandaj. Ankaŭ la postsekvoj estas konsiderindaj. La situacio estis, eĉ nun estas komplika, do estu homo sur sia plando (tio estas hungara onidiro), kiu surpronus la inteligentan klarigadon de la eventoj.


Tamen la ĉefa afero estas, ke oni sukcesis konservi la pacon, kvankam ĝi lamas ankoraŭ. Ni supozas, ke ni ne eraras, kiam ni insistas pri tio, ke ĉiu honesta politikisto devas labori por la gardo de la paco, kaj ankaŭ la simplaj homoj ĉi tie kaj ĉie devas kompreni, ke la plej granda malbono estas la milito, kaj ke ankaŭ la sinarmado ĝis la kolo estas gravega danĝero. La plimulto de la Esperantistoj estas konsekvenca defendanto de la paco. Troviĝas inter la homoj diferencoj laŭ opinio, partiece, riĉeco kaj inteligenteco, laŭ nia opinio eĉ la klasbatalo estas konsiderinda faktoro, sed ĉiuj ĉi diferencoj ne liveras, ne povas liveri sufiĉan pretekston aŭ kaŭzon por eksplodigian katastrofan paŝon. En la finaj tagoj de oktobro kaj en la unuaj tagoj de novembro ni budapeŝtanoj spertis sur nia propra haŭto, kia estas militeto — ankaŭ tio estis terura, sed oni eĉ ne komparu tion al monda milito kun "perfektaĵ" instrumentoj de murdado kaj neniigado.

Tre karaj Samideanoj! En via granda patrujo vivas multaj miloj de hungaroj. Ili

devis elmigri el nia lando antaŭ 50-60-70 jaroj pro la malbona, kontraŭpopola regado de la tiamaj registaroj. Ni, kiuj restis hejme, eĉ nun tre-tre bedaŭras, ke tiuj hungaroj devis serĉi novan patrujojn — kvankam ankaŭ ni estas dankemaj, ke via granda patrujo donis al ili novan hejmon. Kaj kion ni diru pri la novaj elmigrintoj? Ni ne diras pri ili malbonon, ni nur petas ilin: restu honestaj, laboremaj, bonvolaj membroj de la nova lando, ili klopodu akiri la ŝaton kaj estimon de ĉiuj loĝantoj. Kaj al la Esperantistoj hungaraj en Usono — al novaj kaj malnovaj — ni direktas nian peton. Karaj Amikoj! Vi scias, ke la malgranda hungararo faris tre multon por Esperanto. Paŭlo Lengyel, Aleksandro Giesswein laboris fervore kaj memofere por nia afero. Baghy kaj Kalocsay, ĝenerale konataj geniuloj de nia literaturo, Szilagyi en Svedlando, same eminenta literaturisto, Andreo Cseh, plej moderna kaj granda pedagogo de Esperanto estas ankaŭ hungaroj. S-anoj Bonesper, Gabor kaj aliaj hungaraj samideanoj laŭ nia scio ankaŭ estas bravaj kaj honestaj samideanoj en Usono. Kiuj novaj alvenis, ni petas, ĉerpu materialan kaj moralan forton el la etika trezoro de Esperanto, kaj fariĝu pli bonaj, pli socialaj, ol tiuj, kiuj estas fremdaj de la Esperanta sfero.

Karaj kaj estimataj Amikoj! La subskribantoj (la unua estas la prezidanto de la plej granda Esperanto-grupo de Budapeŝto, la dua la ĉefa redaktinto de Enciklopedio de Esperanto) sendas al vi — ankaŭ en la nomo de S-anoj Baghy, Kalocsay, Balkanyi kaj multaj aliaj — multajn sincerajn salutojn, korajn dankojn kaj bondezirojn. En la nomo de la Helpokomitato subskribis Maria Kenesei, prez.; L. Kökeny, sek.

# New York, City of Culture

 HE GREAT CITY OF NEW YORK ... with more than eight million inhabitants, has become the Mecca of tourists from all over the world, for each who comes knows that here he will find what he seeks.

This great City of New York is not only the center of entertainment and finance, but has become the center of fashion and of art. So it is a happy choice to have this year's Congress take place in New York City. We urge the *Kongresanoj* to come to New York a few days before the opening date or to plan to stay a few days after the Congress, and see a few of the wonders the city has.

In the first article I shall write of New York as a center of art and what the lover of painting and sculpture can find here. New York is a city of museums. There are at least thirty-five major museums and a great many smaller private ones scattered throughout the five boroughs. First in importance is the great Metropolitan Museum of Art at Eighty-Second Street and Fifth Avenue. Here is housed a tremendous collection of paintings from all schools of art, sculpture, furniture, armor, costumes, tapestries, jewels from all over the world and from the earliest periods of time down to the present. For many years this museum was a little on the stodgy side, but a new director and a revitalized staff have improved the lighting, re-arranged the groupings and made the museum a much warmer and a more inviting place. A beautiful cafeteria set in a Roman loggia around a pool has replaced the dreary one formerly in use. Little alcove rooms with comfortable sofas and chairs have been created where the footsore may rest and talk with a companion, before going on further. The Museum of Natural History at Central Park West and Eightieth Street has much more to offer in a different field. Here is

the history of man and the story of the animal kingdom. While this is not strictly in the art realm I have included mention of it because in the study of art it is well to know the history of man as a corollary.

The Museum of Modern Art at Fifty-Third Street off Fifth Avenue is a unique experiment that has won a place through the seriousness of its purpose. Here is where the modernist who has something to say has his chance to say it. We may not always understand him, but if he is sincere and honest, we should give him his chance to be heard. One finds Picassos, Dalis, Freys, as well as lesser lights. There is sculpture in wire and steel, as well as the conventional marble. All is beautifully arranged and lighted. The showings are changed quite often. When one tires of this, a step through sliding doors brings one to a garden of cypress trees, clipped yews, and lawns dotted with benches and an open air terrace for refreshment.

Brooklyn has the huge Brooklyn museum which is well worth a visit if only for the freshness of its presentations. An art lover can find his type of art in New York. There is the museum of the American Indian, the Historical Society's Museum. The Whitney, The Cloisters, which offers Medieval art, the Frick Collection, and many others.

There are outdoor exhibitions of art, too. The most important of these is the show which takes place in Greenwich Village twice a year in early summer and fall. Here, around Washington Square, professional artists and amateurs hang

*(Continued on page 13)*



# Trans la Lingvaj Barilojn

*Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, komencis lerni Esperanton en Aprilo, 1955. Post jaro kaj duono ili entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj raportas al ni.*

ROTTERDAM, NEDERLANDO, 20 OKT., 1956

Por sabato vespere ni estis invititaj al granda afero en Rotterdam kiam la Esperanto-grupo "Mercurio" festis sian oran jubileon. Unue estis akcepto de la grupo, je la dua posttagmeze, en Salono Beatrix apud la centra stacidomo, kie ĉeestis pli ol cent personoj; ĵurnalistoj, viroj kun gravaj pozicioj en la urbo, amikoj de Esperantistoj, ktp. Ni renkontis kelkajn gesperantistojn kaj babiladis kun ili, kaj dum la tuta vespero ni ne havis okazon por uzi unu vorton de la angla lingvo. La akcepto finiĝis je la kvina kaj kelkaj nesperantistoj foriris, kaj la aliaj personoj eniris alian ĉambbron por la bankedo.

Ĉe la bankedo ni renkontis multajn esperantistojn — estis proksimume sesdek da ili tie. S-ro J. D. Brakel, prezidanto de Mercurio, lia edzino, ges-roj Isbrucker (li estas prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj s-ino Isbrucker estas vicprezidanto de la Universala Ligo) sidiĝis ĉe la ĉeftablo en la bankedĉambro. Ĉe nia tablo estis s-ino Goud, membro de la esperanta grupo "La Espero", s-ro J. Telling, ĉefdelegito de UEA por Nederlando, kaj kelkaj aliaj samideanoj el diversaj urbetoj kaj urboj ĉirkaŭ Rotterdam. Ni havis bonan interparolon kaj post bongustaj manĝaĵoj s-ro Brakel faris paroladon, kaj ankaŭ f-ino Vermaas kaj s-ro Driesen.

Post la bankedo estis bona programo, sed bedaŭrinde ĝi estis nur en la nederlanda lingvo. Estis deklamatorino, kiu parolis

dum horo kaj duono, kaj evidente ŝi estis bona aktorino ĉar la aŭdantaro ridegis kaj aplaudis dum kaj post la prezentado. Poste, kelkaj rusaj dancistoj dancis kaj kantis dum du horoj. Ĝi estis ankaŭ bona amuzprezentado, kaj denove oni uzis la nederlandan lingvon por anonci la programerojn.


Mi lernis pri kelkaj aferoj rilate al Esperanto kaj la organizaĵoj esperantaj en Nederlando. Unue, estas pli ol tricent gesperantistoj en la urbo Rotterdam, sed oni havas kvar grupojn en tiu urbo. Estas la grupo "Mercurio", la klubo "La Espero" kaj ankaŭ grupo de kristanaj esperantistoj kaj grupo de laboristoj. Kvankam ili havas siajn proprajn kunvenojn, ili tamen estas bonaj amikoj kaj laboras en harmonio por la movado. La afero surprizis min, ĉar en nia urbo, San Diego, en Usono, ni havas nur sufiĉajn personojn por unu grupo, unu kunveno. Eble kiam la afero estos sama en urboj en Usono, ni ankaŭ havos kelkajn grupojn en la sama urbo. Mi ankaŭ lernis ke multaj esperantistoj ĉi tie, kaj ankaŭ tra la mondo, ne estas membroj de la Universala Esperanto-Asocio. Mi opinias ke la tuta esperantistaro devas aparteni al unu internacia, neŭtrala grupo, por kreskigi la esperantan movadon, aŭ la movado ne havos sufiĉan forton por kreski. La lokaj grupoj ankaŭ estas gravaj por la movado, sed unue ni devas havi fortan internacian asocion.

*(daŭrigo en la venonta numero)*

ĈU VI DEZIRAS VIZITI FORAJN LANDOJN? LERNU ESPERANTON!



En la venonta ĉapitro, ni akompanos niajn geamikojn al Germanujo.



## Nia Literaturo

*Literatura Redaktoro: D. B. Richardson,  
3412 North Mullen, Tacoma 7, Washington*

(La libroj recenzitaj en ĉi tiu rubriko estas mendebaj ĉe: Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.)

Kvankam tio ne temas precize pri "literaturo", tamen mi volas atentigi pri kelkaj novaj libroj, gravaj al nia movado. La unua estas lernolibro, "Teach Yourself Esperanto", eldonita de English Universities Press, Ltd., Anglujo. Ĝi ŝajnas al mi tutsimple la plej bona ĝenerala lernolibro por seriozaj studentoj, kiun oni ĝis nun eldonis. Nur ĝenas min, ke la libro estas — kiel tiel multaj aliaj lernolibroj — preskaŭ tro "angla" por la ordinara usona studento. Kelkaj atentigoj pri prononcado, certe tre klaraj al britoj, eble nur konfuzos la usonanon; la prezento de tipe angla "televida programo" en unu leciono signifas malmulton se oni ne havas ian scion pri la televida industrio en Anglujo.

"Teach Yourself Esperanto" povas bone servi en klaso, se la instruanto nur zorgos eviti la kelkajn kaptilojn, kiuj nepre rezultas el lingvo- kaj morodiferencoj inter Britujo kaj Norda Ameriko.

Iun tagon oni eldonos *en Usono* (aŭ eble Kanado) lernolibron pri Esperanto, kiu fariĝos la ĝenerala lernilo por klasoj kaj individua lernado ĉi tie. Oni povus tre

bone fari, imitante la ĝeneralan aranĝon kaj prezentmanieron de ĉi tiu bonega libro.

Aperis la kvara eldono de konata lernolibro (ankaŭ angla), "Esperanto por Infanoj" de G. Gladstone Solomón, eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ĉi tiu verko nun havas pli plaĉan veston: pli da paĝoj, malpli granda paĝformato, pli bona papero kaj tre klara preso, kune kun oftaj desegnaĵoj. La libro celas la tre junajn infanojn, ĉirkaŭ la aĝoj 5 ĝis 8 jaroj.

Oni devus aplaŭdi la aperon de "An Esperanto Vocabulary", poŝformata listo de proks. 3,000 anglaj vortoj kun la Esperantaj tradukoj. La elstara trajto de ĉi tiu verketo (ĝi havas precize 100 paĝojn) estas la noveca maniero de prezento, kaj trafa kaj konciza. Klare sed ne lukse presita, ĝi estas rekomendinda al la ĉiutaga poŝo de kiu ajn Esperantisto, sed precipe la nova.

*Dialekto, Dialektiko*, de Delfi Dalmau, estas interesa libro por seriozaj Esperantistoj. La konata lingvisto prezentas serion de eseoj pri lingvoj, lingvo-uzoj, lingvoinstruado, lingvistoj, ktp. Li diras, i. a.: Lingvo estas ne nur vortoj kaj gramatiko, sed ĝi estas frazoj kaj esprimoj, uzindaj en certaj cirkonstancoj inter certa popolo. Plue: kiel unu homo havas nur unu animon, same li povas havi nur *unu* lingvon, kiu estas propra al li kaj almenaŭ iomete malsimilas al la lingvo de kiu ajn alia homo, eĉ samlanda kaj supozeble "samlingva". Pri Esperanto li konsilas, ke oni ne tro komplikigu ĝin per enkonduko de tro da neologismoj; sed same ke oni ne tro timu la provon, flanke de iuj personoj, enkonduki ilin, ĉar la Esperantista popolo mem elektos la dezirindajn kaj forpelos la nenecesajn.

La libro estas rekomendata malgraŭ la tre multaj preseraroj kaj ĝenerale ne impona teknika apero.

# ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

SEATTLE, WASH.— Anstataŭ la kutima aferkunsido je la 11a aprilo, okazis labor-kunsido por helpi pri dissendo de ĉi tiu numero de la *Revuo*.

Ĉar la redaktoro interŝanĝe ricevas esperantaj gazetojn el multaj landoj, la grupo decidis fari paketojn por sendi al grupoj, kiuj petos por ekspozicioj. Ni sugestas, ke oni sendu kelkajn poŝtmarkojn, por helpi pri la kostoj.

WILMINGTON, DEL.— Dum jaroj ne venis ia ajn raporto pri aktiveco en Delaware. Nun Eskil Svane, nove veninte el Danujo, instruas Esperanton ĉe la YMCA en Wilmington. Okaze de la starigo de la klaso, la *Wilmington Morning News* prezentis interesan artikolon pri li kaj pri Esperanto, kaj oni intervjuis lin dum 15 minutoj ĉe radiostacio WDEL.

WASHINGTON, D.C.— La Esperanto-Klubo de Washington elektis por la venonta jaro: Reed Irvine, prezidanto; W.E. Baff, vicprezidanto; Sergio Docal, sekretario-kasisto. Nova redaktoro de *La Verda Stelo*, bulteno de la klubo, estas F-ino Agnes Bray.

La klubo decidis ke dum estontaj kunsidoj oni parolu nur esperante, escepte per speciala permeso de la prezidanto.

NEW YORK, N.Y.— *Esperanto Society of Greater New York* elektis por 1957: John L. Lewine, prezidanto; I. Boone, vicprezidanto; S-ino Laura Lomo, sekretario; John M. Clarke, kasisto.

La marta kunveno estis speciale dediĉita al helpo al samideanoj en Hungario.

SANTA MONICA, CAL.— D-ro Witt, pioniro de Esperanto, elektigis prezidanto de la *United Nations Society of Santa Monica*.

KIO OKAZAS EN VIA GRUPO?



TORONTO, ONT.— La Centro por Kanadaj Esperantistoj havas 100 membrojn, kaj esperas fondi landan asocion, eble en septembro. Interesataj gesamideanoj skribu al: Centro por Kanadaj Esperantistoj, Box 52, Terminal A, Toronto, Ont. Kanado.

OAKVILLE, ONT.— Ges-anoj R. Eichholz starigis novan entreprenon "Esperanto Press". Se oni deziras utiligi la servojn de tiu entrepreno (presado angle, germane kaj esperante), skribu al: Esperanto Press, Oakville, Ont., Kanado.

PHARR, TEXAS— S-ano Armin Doneis raportas, ke la rakonto pri la vojaĝado de la familio Doneis (kiu aperas per serio de artikoloj en la *Revuo*) vekas grandan intereson. Li unue presigis la rakonton malgrandkvante por sendi al geamikoj. Sed li ricevis tiom da petoj pri ĝi, ke li kredeble baldaŭ devos presigi trian milon.

